# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ huhtikuu ◆ aprilo ◆ 2/2010



*Ĉefa preĝejo de Valamo dum la pasintsomera kursosemajno. Informoj pri la venonta Valamo-kurso sur paĝoj 16-17.* (foto: Harri Laine)

## Vintraj Tagoj plijunigis la estraron, p. 5-10

### Aganto de la jaro, p. 3 ◆ Aŭtunaj Tagoj en Estonio, p. 14

### Stokejo transloĝiĝis, p. 21 ◆ Nova prezidanto al ELFI, p. 10

# ESPERANTOLEHTI

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*
Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 💻 mmakita@utu.fi
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 💻 ilkka.santtila@welho.com
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 22 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ 044 2642 742 💻 eaf@esperanto.fi
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400


## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 💻 eafprezidanto@esperanto.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Paula Niinikorpi*, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 💻 paula.niinikorpi@gmail.com
*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 💻 markku.saastamoinen@kotikone.fi
*Markus Sunela*, Kalevan puistotie 16 B 23, 33500 Tampere. ☎ 040 768 5165 💻 markus.sunela@iki.fi
*Keith (Keke) Uber*, Petter Wetterin tie 4 A 47, 00810 Helsinki. ☎ 040 413 4252 💻 keith_uber@yahoo.com

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Robert Bogenschneider*, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori 💻 robog@gmx.de
*Arvo Karvinen*, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 💻 arvo.karvinen@elisanet.fi
*Tiina Kosunen*, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet**: http://www.esperanto.fi

# Dankoj kaj bonvenigoj



Aliloke en ĉi tiu gazeto vi legas la nomaron de la nova estraro de EAF elektita en la jarkunveno en Jyväskylä, kaj la sinprezentojn de la novaj estraranoj kaj vicestraranoj. La prezidanto trovas sin en nova situacio: La (preskaŭ) tuta estraro estas pli juna ol li mem.

Forrestis la longtempa estrarano Börje Eriksson el Orimattila, ”mem”-artisto kaj esperanta aktivulo, pledanta nian aferon en svedlingva gazetaro kaj organizaĵoj. Ankaŭ d-ro Taneli Huuskonen el Helsinki lasis la estraron, sed ne asociajn kaj klubajn aktivadojn.



Jukka Laaksonen el Tampere longtempe servis en centraj taskoj de la asocio, ankaŭ kiel prezidanto ĉirkaŭ la tempo de la UK en 1995. Nun li petis liberiĝi de vicestraraneco. Vicestrarano Vilorg Teräväinen el Lahti daŭre aktive esperantistas, same kiel Jukka en Tampere – kaj en Valamo en Heinävesi.

Mi petas vin ĉiujn (nun eks)estraranojn akcepti mian plej sinceran dankon kaj aprezon pro via valora laboro, kiu ja daŭras en la movado.


En la nova estraro indas bonvenigi esperantistajn fenomenojn. La novuloj estas de pli nova generacio – sed tute ne sen arto kaj sperto, male. Tri estas plenaĝe alprenintaj esperanton kaj esperantismon, unu estas (almenaŭ preskaŭ) denaska. Du estas denaske eksterfinnlandaj (en la antaŭa estraro unu, kaj ni ankaŭ atentu ke la prezidanto de FEJO nov-finnlandan-as). Kaj estas esperantformita paro en la estraro. Bonvenon, Tiina K, Robert, Maku kaj Keke, ni gemaljunuloj lasas spacon al viaj ideoj kaj laboro.

*Tuomo Grundström*

## Aganto de la jaro

Sylvia Hämäläinen estas nomumita kiel Aganto de la jaro 2009 de Esperanto-Asocio de Finnlando en la asocia jarkunveno. Ŝi ricevis la diplomon pro novigo de la korespondа kurso en *Kansanvalistusseuran Etäopisto* ĉe Orivesi-instituto. Ŝi pretigis la studkonsilojn, kromtaskojn kaj ekzercojn kaj ankaŭ pretas instrui. La kurso estas bazita sur la lernolibro *Esperanto mutkattomasti* kaj estis lanĉita komence de 2010.

# Esperantoyhteisö ottaa osaa puolalaisten onnettomuuteen



10. huhtikuuta levisi maailmalle puolalaisia koskeva hätkähdyttävä uutinen: kymmeniä Puolan korkeimpaan johtoon kuuluvia henkilöitä oli kuollut oltuaan samassa lentokoneessa, joka joutui onnettomuteen.

Onko pelkkää sattumaa ja historian ironiaa, että onnettomuus tapahtui juuri, kun Puolan valtionjohto oli laskeutumassa venäläiselle lentokentälle osallistuakseen puolalaisten ja venäläisten välejä hiertävän maailmansodan aikaisen joukkomurhan muistotilaisuuteen? Ainekset ajatuksille salaliitoista ja järjestetystä onnettomuudesta ovat suorastaan liiankin ilmiselvät. Ainakin internetissä spekulaatiot ja keskustelut käyvät kuumina. En pysty väittämään, että tapauksen taustalla olisi jotain suurempaa tarkoitusta kuin sattuman ja huonojen olosuhteitten ja virheratkaisujen kasautuma, konkreettiseksi tosiasiaksi jää vain, että lentämisessä on aina riskinsä ja samaan lentokoneeseen ei pitäisi koko valtionjohdon yhtä aikaa mennä.

Puola ei ole meille suomalaisille erityisen läheinen maa. Kaikista Itämeren rantavaltioista se on meille ehkä tuntemattomin. Skandinaviaan meillä on historialliset ja kielelliset erityissiteet, Venäjän vastaisesta pitkästä maarajasta emme pääse mihinkään, Saksan kieli on varsinkin aiemmin ollut alueen valtakieli ja edelleenkin sitä opiskellaan ja osataan Suomessa melko paljon, Baltian maat ovat varsinkin Viron osalta melkein kuin oman maamme jatke ja vähintäänkin tunnemme niitä kohtaan pienten maitten keskinäistä sympatiaa ja solidaarisuutta. Mutta mikä yhdistää meitä puolalaisiin? Ei erityisesti mikään. Kieleemmekään ei ole tullut puolasta lainasanoja, joita sekä ruotsista, saksasta että venäjästä on tullut runsaastikin ja meille nykysuomalaisille sinänsä täysin vieraat balttilaiset kieletkin ovat vuosituhat sitten antaneet suomeen koko joukon lainasanoja. Suurissa eurooppalaisissa jaoissakin Puola on päätynyt kanssamme eri puolelle: uskonnollisesti katoliselle ja kylmän sodan aikana sosialistiselle puolelle.

Mutta minkä valtapolitiikka ja sattumukset erottavat, sitä esperanto yhdistää. Heti onnettomuuden jälkeen alkoi suomalaistenkin esperantonharrastajien sähköpostilista täyttyä surunvalitteluviesteistä ja vastauksista niihin, joita kulki suomalaisten ja puolalaisten välillä. Yksittäisten esperantistien kontaktiverkostossa puolalaiset ovat mukanamme yhtä lähellä kuin kaikki muutkin ja esperanton maailmanlaajuisessa organisaatiossa Puola on yhtenä osana muitten joukossa – ehkä vähän enemmänkin kuin yhtenä muitten joukossa, sattuvathan esperanton syntypaikat olemaan juuri Puolassa.

Lausunnossaan (sivulla 13) Kansainvälisen Esperantoliiton pääsihteeri Osmo Buller esittää liiton nimissä osanottonsa puolalaisille. Suomen Esperantolehti yhtyy osanottoon tietoisena siitä, että meillä on lukijoita Puolassakin. Jopa suomen kielen taitoisia lukijoita!

*Mikko Mäkitalo*


# Epokfaranta jarkunveno




Vintraj Tagoj en Jyväskylä, kiuj okazis la 13–14 de marto en jaro 2010, fakte komenciĝis jam antaŭ pli longe, ol venis ties komenco. Kunvenarangantoj ja anticipe solvis multajn demandojn kaj povas fieri, ke iliaj penoj estis ne vanaj. La kunveno, kiu ŝajne estis ordinara, fakte fariĝis kuniganta partoprenantojn ĉirkaŭ homoj de la nova generacio kaj akceptinta novajn ideojn, kio kune aldonas al la kunveno epokfarantan karakteron.

La unua tago pasis en varma kaj hejmeca etoso. En urba biblioteko estis prezentita negranda, sed interesa E-ekspozicio, por kiu estis elektita centra bone travidebla loko. Sur tabuloj pendis sufiĉe grandaj informfolioj kun diversflanka informo pri Esperanto. Okazis ankaŭ prezentado de la internacia lingvo. Deko da urbanoj aŭdis kantadon kun gitara akompano de du blindaj studentoj – freŝaj esperantolernantoj. La prezidanto de EAF rakontis pri la lingvo. Senpere por la renkontiĝo mem estis trovita negranda, tamen multfunkcia ejo, elekto de kiu evidentiĝis esti tre sukcesa, ĉar aperis imago, ke ni kune prezentas rondon familian. La impreson altigis nuancoj, en kiuj sentiĝis mano de profesiulo en sfero de psikologio.

La kunveno komenciĝis per kantoj. Laŭ programo tio nomiĝis muzika interludo. Kantis en akompano de propra gitarludo du studentinoj.



***Ekspozicio en la ĉefa urba biblioteko.*** *(fotoj Robert Bogenschneider)*


*Börje konatigas Keke al minicitro.*

Ili kantis ne sole en Esperanto. Post tio Sylvia Hämäläinen prezentis novan kurson pri distanca lerno de Esperanto. Ŝi sciigis la metodikon de la lernado kaj prezentis rimedojn kaj inter tiuj kurson de lecionoj, lernolibron ”Esperanto mutkattomasti” kaj sondiskon ”Esperanto per rekta metodo”. Indas aparte noti, ke laboro de Sylvia estis dece pritaksita. Ŝi ĉe jarkunveno ricevis titolon Aganto de la Jaro kun enmanigo de konforma diplomo.

Apartan atenton, inter alie, vokis legita fare de ŝi el ”Juna amiko” artikoleto pri sesjara infano, kiu ekdeziris inventi novan, sed ĉi-foje nacian (belgian) lingvon. Naiveco de la infano certe vokis ridetojn, sed la fakto mem estas grava. Ni ja povas vidi, ke krean rilaton al fenomeno lingvo ni povas eduki de tre juna aĝo.

Pro manko de tempo estis iom kurtigita parolo “…pri la finna popola lingvo naskinta nacion…” La temon prezentis Tuomo Grundström. Sed planata diskuto ne okazis. Lingva temo certe ĉiam estas interesa. Se estus tempo por diskutoj, mi oponus al opinio de la preleganto ĉirkaŭ kompreno pri primitiveco de iuj lingvoj. Ĉu iu ajn nacia lingvo povus esti nomata primitiva, se ĝi respondas al ĉiuj aktualaj demandoj de la nacio? Tamen estas certe, ke la lingvo reprezentas soci-kulturan nivelon de la popolo, kiu en ĉiu aparta epoko estas malsama. Tio koncernas ankaŭ apartan homon. Do ni zorgu, ke ankaŭ nia lingvo reprezentu nian kulturan nivelon. Kaj tio atingeblas, se ni uzu la lingvon por aktivi laŭ alvokiĝoj kaj tiel fariĝu aktivuloj, ekzemplojn de kiuj montras al ni niaj estimataj elpaŝantoj kaj prelegantoj.

Klaran ekzemplon, pruvantan tion, montris juna aktivulo Markus Sunela, kiu sukcesis entuziasmigi la aŭskultantojn per bonege prezentita leciono. Temis pri utiligo de Drupal-sistemo por vigligi E-kluban agadon. Laŭ opinio de Markus apero de la sistemo, inter alie, ebligos allogi al Esperanto junularon, ĉar ĝi tre interesiĝas aktivi uze de komputilo kaj interreto. Sufiĉe specifika temo de la prelego estis tiel lerte prezentita, ke Jarkunveno komisiis al Markus praktike realigi la ideon plenumante rolon de EAF-estrarano. Estas aparte notinda, kapablo de Markus sistemigi la parolaton. Li fortigis impreson de la vortoj per prezento de tezoj kaj certaj gravaj sciigoj sur granda ekrano. Simila ebleco devus esti unuavica tasko de nia EAF-estraro.

Post kafo-paŭzo sperta esperantistino Jyväskylä-anino Seija Kettunen sukcesis aperigi gajan memor-demandaron. Kun tiu entrepreno ĉiuj partoprenantoj povis refreŝigi en la memoroj diversjarajn interesajn faktojn, okazantajn dum diversjaraj someraj kursoj en Jyväskylä. Montriĝis interesa kaj gaja aktivado de la partoprenantoj.

Dum antaŭvespermanĝa tempo okazis renkontiĝoj de societoj kaj samtempe lasta kunsido de EAF-estraro. La kunsido tradicie havis tute formalan karakteron, ĉar ĉio jam estis antaŭe priparolita kaj decidita sen aŭskulto de oponaj pritaksoj kaj opinioj. La vespera programo, dank’al inventema muzikista triopo ”Dolchamar”, aperigis en la salono etoson de vera rondo

familia. Sufiĉe lerte ili sukcesis konkeri animojn de la aŭskultantoj.

Tiel pasis la unua tago de VT. Ĝi enmetiĝis inter kantado de du junulinoj kaj kantado de tri junuloj. La ciferoj memorigis la filmon "Du plus tri" en kiu antaŭe estanta kolizio inter du junulinoj kaj tri junuloj finfine venis al akordiĝo. Kaj venis penso, ĉu estos morgaŭa Jarkunveno same akordiga, aŭ kiel jam estis la antaŭa kaj havos formalan karakteron?

EAF-gvidantaro ĉiam tre serioze rilatas al tio, por ke jarkunveno konformu al postuloj de la leĝaro. Do kutime gvidanto de jarkunveno estas elektata el kvanto de la homoj, kiuj kapablas tion fari profesie. Kaj tiu zorgo tute ne estas vana. Ja estas bezonate en certa limigita tempo trarigardi multajn demandojn kaj elekti decajn homojn por nova EAF-estraro. Tial por rolo de la gvidanto bezonas esti elektata la homo, kiu kapablus apartigi ĉefaĵn aferojn de multnombraj bagatelaj. Do por tiu rolo estis elektita spertulo. Sciencisto Jukka Pietiläinen jam ofte sukcese plenumis tiun rolon. Kaj nun li ne sole sukcesis enmeti tutan tagordon en antaŭe planitajn templimojn, sed ankaŭ sukcesis ĝuste kaj koncize formuli por protokolo proponojn kaj decidojn.

Ne estas inde paroli pri rezultoj de la jarkunveno laŭ sekaj punktoj de la protokolo. Ne estas eble prezenti iun ajn deklaron pri estonta rolo de ĉi-jara kunveno. Por ĉio ĉi ankoraŭ venos tempo. Tamen la rezultojn de la jarkunvenoj ĝuste havas premisojn esti epokfarantaj:

1. en konsisto de EAF-estraro kreskis rolo de reprezentantoj de nova generacio;
2. aperis kompreno pri bezono konsideri alvokiĝojn por perfektigi konon de la lingvo kaj aktivigi la agadon;
3. fariĝis videblaj tendencoj de agadevoluo, kio ebligos kompili ne sole planojn por unu jaro, sed ankaŭ perspektivajn planojn;
4. aperis kompreno pri bezono en rondo de aktivuloj regule aranĝi simpoziojn, sur kiuj estus priparolataj studoj de diversaj flankoj de la agado.

Busa ekskurso al Kallioplanetaario kun posta bona tagmanĝo en la planetaria restoracio kronis tiun memorindan kunvenon. Dum busa reveno en la urbon la prezidanto de EAF diris adiaŭajn vortojn al ni kaj en ili substrekis, ke nun li havas en EAF-estraro tute novan situon, ĉar duono de la estraranoj nun estas pli junaj ol li mem. Ni esperu, ke simila renversiĝo ne faros novajn koliziojn inter du generacioj kaj la laboro estos pli evoluiga kaj fruktodona.

Tiel ekvidis la Vintrajn Tagojn kaj rezultojn de jarkunveno

*Vilorg Teräväinen*




***Parto de la nova estraro: Paula, Robert, Tuomo, Päivi, Tiina O., Keke.*** *(fotis Kari Kettunen)*

# Sinprezentoj de novaj estraranoj

**Tiina Kosunen**



Mi nomiĝas Tiina Kosunen kaj estas nun la nova vicestrarano. Ankaŭ mi estas kasisto de EAF. Mi loĝas en Espoo kun mia familio kaj du ĉarmaj katinoj.

Esperanto estis ĉiam parto de mia vivo, ĉar miaj gepatroj estas esperantistoj: patrino ekde la juneco kaj patro post la UK 1969. La distanco inter Dipoli-kongresejo kaj nia hejmo estis nur kelkaj kilometroj, do pluraj kongresanoj loĝis ĉe ni. Iu havis ruldomon kaj kelkaj tendumis sur la korto. Aliaj tranoktis en la domo. Tiu esperanta gastigado daŭris tra jardekoj, kaj multnombro da samideanoj vizitis la hejmon de familio Kilpinen.

Mia unua Esperanto-evento estis tendaro en Vääksy 1971. Post tio mi partoprenis al kelkaj kursoj kaj kongresoj. Mi tre ĝuis vojaĝi en Esperantujo dum la jaroj. Estis interese renkonti la hungaran korespondamikinon en Budapesto 1983. Antaŭ 25 jaroj mi estis ankaŭ junulardelegito kaj membro de FEJO.

Esperanto multege helpis kaj inspiris min lerni fremdajn lingvojn en la lernejo. Tamen mi plej alte taksas Esperanton. Mia revo estas ke ni povus instrui nian belan kaj unikan lingvon al infanoj kaj tiel donaci lingvoscion kaj pli vastan mondon al novaj generacioj.

**Keke Uber**



Mi esperantiĝis en la jaro 2004, dank' al rapida semajnfinkurso de Esperanto-klubo de Jyväskylä. Saliko instruis min kaj 6 aliajn homojn. Post tio mi memstudis kaj regule partoprenis en la kunvenojn de la klubo. Seija kaj Kari Kettunen kaj aliaj esperanto-amikoj en Jyväskylä vigligis kaj multe helpis min. Mi restas kiel membro kaj prizorgas la hejmpaĝon de la klubo, kvankam nun mi loĝas en Helsinko. Mi estas ankaŭ aktiva membro de FEJO kaj vicprezidanto ekde 2009.

Mi naskiĝis en Aŭstralio, mia hejmurbo estas Melburno. Mia patro estas usonano kaj mia patrino estas anglino. Mi transloĝiĝis al Finnlando jare 2000. Tiam mi laboris ĉe finna firmao en Usono, kaj vizitis Finnlandon por edukadprogramo. Hazarde mi akceptis proponon por labori en Finnlando kaj loĝis kaj laboris en Lappeenranta ĝis 2002. Post tio mi studis dum unu jaro en Indonezio (Jogĵakarto), unu jaro en Ruslando (Sankt-Peterburgo) kaj dum 3 jaroj en Jyväskylä. Mi diplomiĝis jare 2008 kiel komercisto de programaroj kaj nun mi laboras en Espoo.

En 2009 mi feliĉe partoprenis mian unuan Universalan Kongreson en Bjalistoko kaj mi vizitos Kubon ĉijare. Miaj ŝatokupoj estas inter aliaj: piedpilko, unihokeo kaj vojaĝado. Dum mia oficperiodo kiel estrarano mi volas fari i.a. novan retpaĝon por EAF kaj reaktivigi la malnovan vortaro-projekton.

## Robert Bogenschneider

Mi naskiĝis antaŭ 43 jaroj, en sudgermana regiono proksime al Svislando.

Informadika studo kondukis min 1988 al Stuttgart, kie mi konatiĝis kun Esperanto unue teorie, kaj praktike ekde la jaro 2000. Providence iĝinta kunfondinto de la loka grupo en Konstanco (lime al Svislando), ekde tiam mi preskaŭ ĉiutage uzas Esperanton ĉefe en interreto, vizitis multajn aranĝojn (de loka, regiona, landa kaj internacia skaloj) kaj klubojn. KEF 2005 en Helsinko konatigis min kun Paula – septembre 2007 mi venis al Finnlando por vivi kun ŝi.

Ĝis fino de majo mi estas en kurso, kie eksterlandanoj plibonigas siajn sciojn pri la finna kaj pretiĝas al metilernejo.



Jam en la federacilanda Esperantoligo BAVELO mi iĝis estrarano por du jaroj, havas do ian imagon pri la tasko, kaj intencas simile okupiĝi pri interreta prezentado kaj informinterŝanĝo, kunlabore kun la aliaj estraranoj kaj aktivuloj de EAF kaj FEJO.

Por plibonigi la retejon certe bezonatas ideoj kaj proponoj de ĉiuj aktivuloj – do, sciigu viajn dezirojn aŭ imagojn al la estraro.

## Markus Sunela



Saluton senpartie al ĉiuj! Mi estas Markus Sunela, aŭ pli kutime Maku, kiel miaj amikoj kaj parencoj nomas min. Origine mi devenas de Kurikka, kio situas en Suda Botnio, sed dum lastaj ses jaroj mi loĝas preskaŭ en la centro de Tampereo kune kun mia edzino. Nun mi estas 24-jara, kaj mi ĵus eklaboris kiel projektinĝeniero en kompanio FCG Finnish Consulting Group. En la kompanio mi plejparte planos akvotubretojn por urboj, sed nun mi ankoraŭ verkas mian diplomverkon tie. Dum lastaj kvin jaroj mi studis mediteĥnikon (ympäristötekniikka) kaj aŭtomatigadon en Teĥnika universitato de Tampereo. Samtempe mi ankaŭ laboris kiel programisto en malgranda kompanio Norfello. Miaj studantaj jaroj inkluzivis ankaŭ duonjaran interŝanĝperiodon en Teĥnika universitato de Talino en Estonio.

Miaj plej gravaj ŝatokupoj estas legado, biciklado, kurado, skiado kaj kanotado. Mi ankaŭ multe laboras kun komputiloj; precipe mi programas ĉiuspecajn programojn. En mia antaŭa profesio mi multe laboris kun Interretaj programoj kaj retejoj kaj poŝtelefonoj kaj -komputiloj. Ĉiuspecaj uniksoj kaj liberfontaj programoj estas por mi plej interesaj. Mi ankaŭ estis kaj fojfoje eĉ ankoraŭ nun estas aktiva skolto, kaj tio ne estas ŝatokupo sed vivmaniero! Pro mia skolta kariero mi havas multe da spertoj pri asocia laboro.

Mi esperantistiĝis antaŭ preskaŭ du jaroj. Kiam mi estis faranta mian bakalaŭran verkon por universitato, mi hazarde trafis ie en la Interreto artikolon pri volapuko. Mi tuj memoris, ke iam en Aku Ankka estis iu bildstrio, en kiu Aku fuŝis ĉion, tial ke li ne komprenis la instrukciojn skribitajn en volapuko. Mi ege surpriziĝis, tial ke fakte volapuko estis vera lingvo, kaj tiel interesiĝis pri interlingvistiko. Baldaŭ mi multe legis pri volapuko, interlingua, Esperanto, ido kaj aliaj lingvoj, kaj baldaŭ mi konstatis, ke Esperanto estas la plej vivanta kaj la plej taŭga el ▷

▷ ĉiuj ili. Do mi eklernis ĝin: mi tralegis la interretan esperantokurson de Marko Rauhamaa, aĉetis vortaron kaj Fundamentan krestomation kaj eklegis en Esperanto, kaj tiel lernis la lingvon.

Ĝis la lasta somero mi tute ne aktiviĝis en la Esperanto-movado, mi nur legis librojn kaj aŭskultis radiojn kaj muzikon en Esperanto. Tamen finfine mi kuraĝis renkonti kun membroj de Antaŭen. En lasta aŭtuno mi fondis junularan grupon en Tampere, kaj nun mi estas individua membro de UEA kaj de multaj aliaj Esperanto-organizoj, kaj sekretario de FEJO kaj vicestrano de Antaŭen.

Miaj plej gravaj movadaj celoj estas ĉi tiuj du: 1) varbi kaj aktivigi gejunulojn kaj 2) fari mian eblon, ke E-organizoj plej eble bone kaj efike utiligu modernajn eblecojn de Interreto. Principe tio signifas, ke mi volas fari Esperanton pli loga al junularo. Pro tio la asocioj devas ŝajni modernaj, junecaj kaj aktivaj, kaj la asocioj devas aktive varbi en universitatoj kaj en junularaj eventoj. Videbleco estas la ŝlosilo!

## ELFI havas novan prezidanton kaj estraron

Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, ELFI, havis sian jarkunvenon en du partoj. La unua parto estis dum Vintraj Tagoj en Jyväskylä 13.3.2010 kaj la dua parto en Tampere 10.4.2010. La laŭstatutaj aferoj estis traktitaj dum ĉeesto de deko de partoprenantoj.

La nova estraro de ELFI estas jena:

- Prezidanto Sylvia Hämäläinen el Ylöjärvi
- Vicprezidanto Raita Pyhälä el Lestijärvi
- Sekretario kaj vicmembro Tapani Aarne el Tampere
- Kasisto Tuomo Grundström el Rauma
- Ordinaraj estrarmembroj: Harri Laine el Espoo kaj Tiina Oittinen el Turku
- Vicaj estrarmembroj: Tapani Aarne (ankaŭ la sekretario) kaj Carola Antskog el Kimitoön

Synnöve Mynttinen estis elektita reprezenti ELFIn en la konferenco de ILEI en Kubo.

ELFI dankas la multjaran prezidanton Carola Antskog, kiu i.a. iniciatis kaj realigis la Euroscola-projekton de Finnlando. La nuna estraro provas revivigi la projekton plej eble baldaŭ.

Alia projekto por la agadjaro estos plibonigo de TTT-paĝoj kunlabore kun EAF. La membrocirkulero Interligilo tamen estas sendita 1–3 -foje dum la jaro kiel letero.

Se vi deziras membriĝi en ELFI kaj tiel subteni la laboron por instruado de Esperanto en Finnlando, jen la membrokotizoj:

MIPR-membro 26 e (ricevas papere la revuon IPR de ILEI)

MJA-membro 26 e (IPR rete kaj papere la eduka gazeto Juna Amiko)

MI-membro 13 e (IPR rete)

Speciale ELFI deziras instigi ĉiujn, kiuj instruas Esperanton aŭ/kaj gvidas diskut- kaj studrondojn. Kontaktinformoj de ELFI estas sur antaŭlasta paĝo.

*Estraro de ELFI*

## Eventokalendaro de EAF

**2010**

27.6.–2.7.2010 Esperantokurso en Popola Instituto de Valamo, Heinävesi

17.–24.7.2010 Universala Kongreso de Esperanto, Havano, Kubo

10.–12.9.2010 Aŭtunaj Tagoj en Estonio

**Laborkunsidoj**

12.6.2010 Estraro



## Kanto de Mezfinnlando

Unu el la muzikaj perloj en la Vintraj Tagoj estis la provinca kanto de Meza Finnlando, *Keski-Suomen maakuntalaulu* (Männikkömetsät ja rantojen raidat...) prezentita de la junulina duo. La poemo estas verkita de Martti Korpilahti (1886–1938), instruisto, muzikisto kaj poeto. Li eldonis kolektojn de estonaj kaj hungaraj kantoj finnlingve; inter liaj tradukaĵoj de ĉiuj certe konata estas la *Julkanto de Silvio* el Topelius.

La melodio de la kanto estas de sveda kolego de Korpilahti, instruisto kaj orgenisto Ivar Widéen (1871–1951). Indas mencii ankaŭ lian alian verketon el 1919 konatan de ĉiuj finnoj: Numeron 492 en la finna Psalmlibro (*Ystävä sä lapsien*).

En EF 3/2009 ni aperigis esperantan Kanton de la provinco Satakunta, omaĝe al Pori. Pliaj bonvenas.

*tg*

*Pinoarbaroj kaj bordsalikaroj,*
*ĉirkaŭ valrandoj betula densej'.*
*Kiel fascinas paŝado laŭ padoj*
*inter flormonto kaj fragokreskej'.*
*Verda profundo de boskaj folioj,*
*brila okulo de rokranda lag',*
*alto de montaj majestaj abioj.*
*Hejmo benata en ĉiu tag'!*

*Laŭdas la filo de sia popolo*
*hejmregionon en sia patri'.*
*Lin ĝi edukis, kaj do lia volo*
*estas dediĉi vivverkon al ĝi.*
*Tie ekkreskis popola pragento,*
*tie aperis amika fidel'.*
*Tien revenas vagul' kun amsento*
*al la hejmlanda eterna bel'.*

# Malferma Tago spite la cindra nubo

Pli ol 70 partoprenantoj vizitis la 32-an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 17-an de aprilo. Multaj estis malhelpitaj pro nuligitaj flugoj aŭ fortimigitaj de plenplenaj trajnoj sekve de la haltigo de aertrafiko pro la cindra nubo elsputita de islanda vulkano.

La ĉefgasto estis d-ro Mark Fettes, asista profesoro pri edukado en la Universitato Simon Fraser en Vankuvero. Fettes prelegis dufoje pri Esperanto kaj la monda eduka problemo, klarigante sian ideon pri UEA kiel unuavice eduka organizaĵo. Nora Caragea legis el "Pacrakontoj", kiu estas jam la kvara libro de la germana aŭtorino Gudrun Pausewang en ŝia traduko. Rob Keetlaer prezentis sian retejon pri proverboj, *www.proverbaro.net*. Sian agadon prezentis ankaŭ TEJO kaj Esperanto@Interreto (E@I), dum komitatano Johan Derks diskutigis interesitojn pri la utilo de reta decidfarado. Ankaŭ pluraj filmoj estis montritaj.

La Libroservo vendis sume por € 2107,52. La ĉefa furoraĵo (8 ekz.) estis la nova "English-Esperanto-English Dictionary" de John Wells. De "Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj" kaj la Tonkinfestlibro "La arto labori kune" estis venditaj po 6 ekz.

La venonta Malferma Tago estos sabaton, la 27-an de novembro 2010.

*(el komuniko de UEA prenis mm)*

---

## Furoris en 2009

La ekzerclibreto "Poŝamiko" de B. Allée kaj K. Kovats estis la plej furore vendita libro de UEA en 2009. La klasika lernolibro "Ĉu vi parolas tendare?" de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre post longa pauzo regajnis altan lokon dank' al mecenata aĉeto por afrikanoj.

Aparta statistiko pri unuekzempleraj vendoj donas pli nuancitan bildon pri la efektiva populareco de la titoloj en 2009. La nombrojn de entutaj vendoj ĉefe difinas la kvantaj mendoj de aliaj libroservoj, kiuj evidente pluvendis nur parton de siaj aĉetoj al unuopuloj jam pasintjare. En la alia statistiko venkis "Esperanto de nivelo al nivelo" (51), ekzercilo por ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro.

La Libroservo vendis sume por 113 298,47 EUR, t.e. 9,4% malpli ol en 2008. La malkreskon ĉefe klarigas fenomeno konata el membrostatistikoj, "kongresa efiko": en 2008 dum la Roterdama UK la vendoj sumiĝis je 40 504 EUR, sed en Bjalistoko same multe da kongresanoj butikumis por 29 000 EUR (-11 504).

Vendoj entute (nombro, titolo, aŭtoro, prezo EUR):

392 Poŝamiko (B. Allée & K. Kovats) 5,10
213 Ĉu vi parolas tendare? (R. Corsetti, M. La Torre)* 4,80
179 Vojaĝo en Esperanto-lando (B. Kolker)* 18,00
167 Esperanto de nivelo al nivelo (M. Kovács k.a.) 10,50
121 Pocket Esperanto Dictionary (A. McLinen)* 15,00
112 Monumente pri Esperanto (H.Röllinger)* 7,50
106 Utila Estas Aliĝo (U. Lins)* 15,00
100 Vivo de Zamenhof (E. Privat)* 9,00

Vendoj unuekzempleraj:

51 Esperanto de nivelo al nivelo (M. Kovács) 10,50
39 Utila Estas Aliĝo (U. Lins)* 15,00
30 Morto de artisto (A. Löwenstein)18,90
30 Vojaĝo en Esperanto-lando (B. Kolker)* 18,00
28 Beletra Almanako 4 9,90
27 La Asocio (Z. van Dijk)22,80
25 Homarano (A. Korĵenkov) 27,00
25 Plena ilustrita vortaro de Esperanto 90,00
23 La origino de specioj (K. Darvino) 22,80
23 Pasporta Servo, listo de gastigantoj* 15,00

* eldonaĵoj de UEA/TEJO

## UEA kondolencas polojn

Nome de Universala Esperanto-Asocio mi kondolencas Polan Esperanto-Asocion, la polajn membrojn de UEA kaj ĉiujn polajn esperantistojn pro la tragedia pereo de la Prezidanto de la Pola Respubliko s-ro Lech Kaczyn'ski, lia edzino kaj multaj elstaraj reprezentantoj de la pola publika vivo en aviadila akcidento.

Esperantistojn tiu ŝoka informo tuŝas aparte pro la historiaj ligoj de la Internacia Lingvo kun Pollando, kies ĉefurbo estas la naskiĝurbo de Esperanto. La varmaj sentoj de esperantistoj pri Pollando montriĝis kaj pli firmiĝis pasintjare lige kun la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, per kiu la Esperanto-movado omaĝis la 150-an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof en tiu urbo.

Niaj pensoj estas denove en Pollando, ĉi-foje plenaj de funebro kaj kunsento kun la proksimuloj de la forpasintoj.

*Osmo Buller*
*Ĝenerala Direktoro de UEA*

## Kievo gastigos IJK-n 2011

TEJO ĝojas anonci, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Ukrainio. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno. La temo proponita estas ”Stabila evoluo – nova koncepto por homaro”. La aranĝo okazos julie 2011 proksime de Kievo, ĉefurbo de Ukrainio. La organizan teamon kreos UkrEA (Ukrainia Esperanto-Asocio) kaj ULEJ (Ukrainia Ligo de Esperantista Junularo). Temos pri la unua IJK en Ukrainio. La kongresejo troviĝas proksime de la Kieva akva rezervejo.

La ĉi-jara, 66-a, Internacia Junulara Kongreso okazos en Kubo. Pli da informoj ĉe *http://tejo.org/ijk/2010*.

*(el komuniko de UEA prenis mm)*

**ALIĜILO**

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 10.–12.9.2010 en Estonio

Nomo

______________________________

Adreso

______________________________

Telefono (portebla)

______________________________

Ret-adreso

______________________________

La kotizoj kaj limdatoj aperos en Esperantolehti 3/2010. Laŭ nuna takso la kostoj po partoprenanto estos inter 170–250 eŭroj. Tio inkluzivas aliĝkotizon, tranoktadon en Tallinn kaj Tartu kaj ŝipvojaĝojn kaj busveturojn tien kaj reen.

Bonvolu aliĝi por informi al EAF vian intereson pri la aranĝo.

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF:

______________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65
FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

BONVENON!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 10.–12.9.2010 Virossa

Nimi

___

Osoite

___

Puhelin (kännykkä)

___

Sähköposti

___

Maksutiedot ja ilmoittautumispäivät tulevat Esperantolehteen 3/2010. Hinnaksi tulee arviolta noin 170–250 euroa/osallistuja. Pakettiin sisältyy ilmoittautumismaksu, yöpymiset Tallinnassa ja Tartossa, laivamatkat ja bussimatkat Virossa.

Ilmoittaudu, jotta tiedämme kiinnostuksestasi matkaa kohtaan.

Lisätietoja ja/tai toivomuksia

___

Lähetä lomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65
FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse
*eafmendoj@esperanto.fi*

TERVETULOA!

***EF = Estonoj kaj Finnoj***
***Aŭtunaj Tagoj internacie***

# Tartto – hyvien ajatusten kaupunki

Tarton asukasluku on 101 246 (vuoden 2000 tilanne) ja pinta-ala 38,8 neliökilometriä. Siten se on Viron toiseksi suurin kaupunki. Tartto on myös Etelä-Viron keskus; matkaa Tallinnasta kertyy 185 km. Emajoki, joka yhdistää kaksi Viron suurinta järveä, virtaa kaupungin halki 10 km matkalla ja antaa kaupungille oman ilmeensä.

Ensimmäinen kirjallinen maininta Tartosta on vuodelta 1030.

*Ni legas bazajn informojn pri la najbarlanda lulilo de kulturo; kio Turku en Finnlando, tio Tartu en Estonio. Multaj finnoj vizitis Estonion multfoje, sed nur la ĉefurbon, kiu ofertas viziton al eĉ urĝa turisto. Sed Tallinn ne estas Estonio, eĉ pli prave ke Helsinki ne estas Finnlando.*


*En Tartu estas universitato de 1632. Ni esperantistoj sciu, ke ĝia plej fama lingvisto en la 20-a jarcento estis Paul Ariste (1905–1995), jam junaĝe elstara esperantisto. Membro de Estona Scienca Akademio (kaj honora membro de la Finnlanda kaj Hungara), li estis aŭtoritata apoganto de la esperanto-movado en la malfacilaj sovetaj jaroj. Tartua universitato daŭre estas grava interlingvistika centro kun i.a. profesoro Aleksandr Duliĉenko.*

*La Aŭtuna-Taga semajnfino konsistos el vespero kaj tranokto en Tallinn, tagnokto en Tartu kaj turisma reveno tra Tallinn al Helsinki. En ambaŭ urboj ni renkontos esperantistojn kaj ĝuos turisman, movadan kaj artan-sciencan programon. Anoncu vin tuj, aliĝilon trovu apude.*

Syyspäivien viikonlopun ohjelmaan kuuluu matka Helsingistä Tallinnaan perjantaina ja yöpyminen siellä. Seuraavana päivänä lähdetään omalla bussilla Tarttoon, jossa tutustumme kaupunkiin, mm. yliopistoon. Mukaan matkalle tulee Viron esperantisteja ja tapaamme heitä myös Tartossa yhteisen illanvieton merkeissä. Paluumatka Tallinnaan ja Helsinkiin on sunnuntaina.

Tarkemmat ajat, hinnat ja muut matkan yksityiskohdat tulevat seuraavaan Esperantolehteen, mutta ilmoittautua voi heti.

*Bonvenon, Tervetuloa,*
*Tere tulemast!*
*EAF-estraro*






Tarton yliopisto



Tarton keskustaa

## Printempa ekskurso al la ekologia bieno en Keuruu

**Sabaton 22.5.2010**

Esperantoklubo de Jyväskylä invitas esperantistojn kun siaj amikoj partopreni jam tradician printempan ekskurson – ĉifoje en Keuruu.

**Renkontiĝo** en la ekologia bieno, Kivijärventie 300 je la 11.00, reveno ĉ. 15.00.

Dum la tago ni konatiĝos kun la vivo en la bieno, havos vegetaran lunĉon kaj kafon kaj faros mallongan promenadon en la ĉirkaŭaĵo.

**Prezo** 10 €/pers. inkludas prezenton kaj lunĉon.

**Aliĝoj kaj demandoj** al Seija Kettunen tel. 040 867 2743, *seija.kettunen@pp5.inet.fi*

# Valamon kurssin uudistettu ohjelma

Valamon kansanopiston kesäisen esperantokurssiviikon ohjelmaa on uudistettu. Kurssi alkaa jo sunnuntaina Valamon alueen esittelyllä ja tutustumisillanvietolla. Näin opiskelemaan päästään heti maanantai-aamusta. Kurssi on tarkoitettu niin alkeista aloittaville kuin esperantoa jo sujuvasti käyttäville. Tässä päivittäinen ohjelma pääpiirteittäin (muutokset mahdollisia).

**Sunnuntai 27.6.2010**

17.00 Kokoontuminen keskusaukiolla. Kiertokävely luostarin alueella ja tutustuminen sen toimintaan. Tutustumisilta opiston oleskelutiloissa. Ilta päättyy noin klo 21.00.

**Maanantai 28.6.2010**

